Eduardo Missoni
Ĝenerala Sekretario

Monda Skolta Oficejo
Rue du Pré Jerôme 5
Pŝtkesto 91
1211 Ĝenevo 4 Plainpalais
Svisio
Telefono (+41) 22 705 10 10
Fakso (+41) 22 705 10 20

Cirkulero n.o 33/07

Ĝenevo 2.11.2007

Institucia krizo de MOSM

Dum la lastaj semajnoj, la Monda Organizo de la Skolta Movado travivis institucian situacion pri kiu mi devas vin informi..

1 - La 15an de oktobro, kelkaj Landaj Skoltaj Organizoj (LSO) sendis al la anoj de la Monda Skolta Komitato malferman leteron enhavantan kelkajn asertojn pri la regadon kaj la mastrumadon de la Monda Organizo de la Skolta Movado (MOSM) kaj indikantan al la Komitato iujn specifajn agojn decidendajn. La letero vaste cirkulis inter la LSO-oj.

Kiel unua reago al la letero, la prezidanto de la MSK respondis al la LSO-oj la 18an de oktobro indikante la paŝojn faritajn de la Komitato por analizi la situacion.

2- La 17an de oktobro la Boy Scouts of America (BSA) sendis al la anoj de la Komitato leteron subskribitan de sia Internacia Komisiito, li mem membro de la MSK, asertante sian vidpunkton pri kelkaj temoj koncerne al la regado kaj anoncante sur tiu bazo kaj por la unua fojo sian firman decidon halti la pagon de ĉiu sumo (kotizoj, kontribuoj, kaj apogo al la laborgrupoj) al la Monda Skolta Oficejo (MSO) kaj al ĝiaj regionaj oficejoj ĝis la anstataŭo de la nuna ĝenerala sekretario. Tiu letero vaste cirkulis inter la LSO-oj kun la alia menciita supre ĉe 1. Svedio decidis same, kaj aliaj LSO-oj anoncis skribe aŭ buŝe ke ili povus halti la pagon de siaj kotizoj.

3- En la sama periodo, letero de la Monda Skolta Fondaĵo (MSF) kun dato 16a de oktobro, kaj enhavanta similajn asertojn estis sendita al la prezidanto de la MSK kaj kopie al ĉiuj estraranoj de MSF. Ankaŭ tiu letero vaste cirkulis inter la LSO-oj. La letero ankaŭ antaŭvidis proponon al la estraro de la MSF, ne anoncita antaŭe, halti la pagon de la jaran kontribuon de MSF al la MOSM atendante ke la Komitato korektu serion da regadaj problemoj listigitaj en la letero. Tamen la pagoj ĉesis tuj.

4- La rezulto de la du haltoj de pagoj (entute ĉirkaŭ 40% de la buĝeto de la MSO, centra kaj regionaj) metas la MSO en teruran situacion. Eĉ se la LSO antaŭpagus siajn kotizojn, la MSO ne povus liveri siajn servojn dum pli ol kelkaj monatoj. Poste, ĉiu agado de MOSM haltus, inkluzive de la preparo de la Monda Skolta Konferenco planita por julio 2008 en Koreio. Tio metas MOSM antaŭ institucian krizon kies grandecon ĝi neniam spertis antaŭe.

5- La anoj de Komitato kunvenos eksterordinare en Kajro la 12an de novembro por alfronti tiun situacion. Ni informos vin pri la sekvoj.

Sincere via

Eduardo Missoni
Ĝenerala Sekretario